

*Gazeto*   
 *Andaluzia*

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

29-a Jarkolekto \* Januaro 2014 \* N-ro 98

ISSN 1576 - 0618



**SANLUCAR DE BARRAMEDA**

**kie la rivero Gvadalkiviro fariĝas oceano**

Gazeto Andaluzia  
Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.  
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto  
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)  
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.  
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ  
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ  
(esperanto14@ono.com)

### ENHAVO

Esperanto en Andaluzio .....	3
Universitato de Esperanto .....	6
73-a Hispana Kongreso kaj 18-a Andaluzia Kongreso de Esperanto .....	8
La Andaluzo kiu inventis ŝtaton en Sudameriko .....	13
Lingva Angulo .....	16
Turismi en Sanlucar de Barrameda (Kadizo).....	21
Paĝoj pri nia historio .....	25
Flamenko .....	28
Andaluza Kuirarto.....	31
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio .....	32
Krucvortenigmo .....	33
Humuro.....	34

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.  
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



## ESPERANTO EN ANDALUZIO



### SEVILO

De oktobro ĝis decembro 2012-a, nia amiko Rafaelo Mateos instruis esperanton en la Publika Biblioteko de Sevilo (Parko María Luisa). Temis pri tri grupoj po 15 homoj, inter ili kelkaj eksterlandanoj (Filipinoj, Koreio, Portugalio, Meksiko kaj Kolombio).



### JEREZO

La agado de Rafaelo Mateos cele la instruadon de la internacia lingvo ŝajnas senlima. Dum la monato januaro 2013-a, li ekigis elementan kurson de esperanto ĉe la Publika Biblioteko de Jerezo, sub la aŭspico de la Turisma kaj Kultura Fako de la Jereza Urbodomo.

### GRANADO

★ Ekde nun estas eble trovi kaj aĉeti librojn en kaj pri esperanto ĉe librovendejo en Granado, temas pri *Libería Bakakai*, strato Tendillas de Santa Paula n-ro 11. Pliaj informoj troveblas ankaŭ ĉe [www.libreriabakakai.net](http://www.libreriabakakai.net).



★ De la 6-a de junio ĝis la 26-a de julio 2013-a ĉiujāude ĉe la Junulara Domo de Granado, strato Veronica de la Magdalena, renkontiĝis granadaj geesperantistoj dezirantaj perfektigi sian lingvan nivelon. La renkontiĝoj estis tute malfermitaj por tiuj kiuj deziris eklerni la internacian lingvon.

## ALMERIO

Ĉu io komenciĝas en Almerio? Probable jes. Esperantistoj de la provinco ekfunkciigis la fejsbukan paĝon *Esperanto Almería*. Vizitu ĝin kaj partoprenu en la dialogoj ĉe la adreso: <https://www.facebook.com/groups/1379391832291996/> aŭ simple kliku en fejsbuko “Esperanto Almería”.

## SEVILO

La 16-an de februaro 2013-a okazis en Sevilo la Ordinara Asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Ĉeestis membroj de la asocio de Sevilo, Malago, Kordovo kaj Arundo. Jen resumo de ĉio decidita:

- Oni parolis pri la pasinta Andaluzia Kongreso de Esperanto en Granado kaj la ĝenerala opinio estis, ke temis pri sukcesega renkontiĝo, ne nur pro la nombro da gepartoprenantoj, preskaŭ 50, sed ankaŭ pro la programeroj kaj la afabla etoso de la Kongreso. Oni parolis pri la okazigo de la 18-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, kiu kvankam unuamomente oni pripensis okazigi en Jerezo, finfine oni decidis organizi ĝin en Arundo, koincide kun la Hispana Kongreso de Esperanto.
- Rilate la eldonaĵojn de nia asocio, oni decidis ŝanĝi la nomon de la interna bulteno de AEU, ĝis nun *Monate ĉe Vi*, tiel la venonta numero aperos sub la nomo *AEU-Bulteno*. Rilate *GAZETO ANDALUZIA*-n, la redaktoro memorigis, ke baldaŭ aperos la numero 100-a, do oni decidis eldoni tiuokaze specialan kaj ampleksan numeron.

- Oni parolis pri la kursoj de esperanto okazantaj en Andaluzio. La Asembleo decidis danki speciale al S-ro Rafael MATEOS, kiu ĵus organizis kursojn en Seviljo kaj en Jerezo.
- La kasistino prezentis la kontojn de la Asocio, kiu dum la jaro 2012-a atingis malgrandan mon-profiton, feliĉe la Asocio ne perdis monon dum la pasinta jaro.
- Oni decidis aktualigi la liston de membroj de nia asocio, por koni ekzakte kun kiom da membroj AEU povas kalkuli.
- Fine, la Sekretario de AEU havigis sian privatan libro-kolekton pri esperanto ka interlingvistiko al la Asocio, tiel AEU posedas jam bibliotekon enhavantan 400 librojn. La definitivan liston ni aperigos en niaj revuoj post la definitiva katalogado.



🖥 <http://andaluciaesperanto.blogspot.com.es>

✉ [esperanto14@ono.com](mailto:esperanto14@ono.com)

☎ 625688924

☎ 666075129

## UNIVERSITATO DE ESPERANTO

Unu el la plej interesaj projektoj naskiĝintaj dum la jaro 2012, tio estas, kiam nia lingvo fariĝis 125-jara, estis la kreo de la Universitato de Esperanto. Ĉi tiu nova universitato baziĝas sub la sperto de aliaj kiuj jam enmetis kaj disvastigis siajn kursojn pere de interreto.



Do, la fundamenta celo de la Universitato de Esperanto estas

disponigi kompletajn filmetojn kaj bazajn kursojn tute en la internacia lingvo, por la nuntempa kaj venonta komunumo de parolantoj de esperanto. La kursoj de ĉi tiu universitato instruiĝas per nia lingvo, sed ne necese temas pri esperantologio aŭ interlingvistikaj aferoj. Do, temas pri instruado PER esperanto, ne PRI esperanto.

Temas pri ĝeneralaj kursoj, tio estas, ne pri tre konkreta afero, tio signifas, ke ĉiu kurso estas speciale taŭga por tiuj universitataj studentoj de la unua aŭ dua jaro de iliaj studoj, ĉar neniu kurso devas bezoni la antaŭan lernadon de alia kurso.

Rilate la profesorojn, ili devas posedi oficiale rekonatan doktoran diplomon laŭ ne-esperantistaj kriterioj. Ili, kompreneble, sufiĉe bone devas paroli la internacian lingvon. Kaj se paroli pri la studentaro, ili devas esti universitatoj, tio estas pli ol 18-jaraĝaj. Ilia nivelo de esperanto devas esti sufiĉe alta por kompreni la kurson, sed ili ne bezonas paroli kaj skribi perfekte, laŭ la KER-sistemo niveloj B1 aŭ B2 probable sufiĉus.

La organizado de la kursoj sekvas du programitajn stadiojn. La unua etapo estas la organizado de loka klaso, kun ĉeestaj studentoj, kaj

la filmado (vide kaj aŭde) de kompletaj ĉeestaj kursoj. Prefere ĉi tiuj kursoj devas esti agnoskitaj de loka Universitato kiu gastigas ĝin, cele pli alte valorigi la partoprenajn atestilojn kaj eventuale, ekzamenojn. Ekzemple, du kursoj kun filmado jam okazis inter la 11-a de januaro kaj la 12-a de februaro 2012 sur la insulo Hajnano en Ĉinio, unu el ili estis agnoskita de Nankina Universitato.

La dua etapo estas la surretigado de la filmitaj kursoj sur interreto, por ke eventualaj postaj studentoj povu ĉeesti hejlstudajn kursojn. Kiujn kursojn oni proponis jam en la Universitato de Esperanto?

Ĝis nun estas eble sekvi tri kursojn:

- 1) Alfronti Militon. Temas pri 20 lecionoj de 2 horoj gviditaj de la Profesoro Ron Glossop de Usono.
- 2) Filozofio kaj Historio de la Informadiko. 20 lecionoj de 2 horoj de la Profesoro Federico Gobbo de Italio.
- 3) Enkonduko al Astronomio kaj Astrofiziko. 33 lecionoj de la Profesoro Amri Wandel de Israelo.

Kaj Esperanta Jura Asocio preparas nun la filmadon kaj postan enretigon de kurso pri Internacia Juro de la Maro, kiu espereble finiĝos antaŭ la venonta somero, ĝi estos realigata ĉi tie en Andaluzio.

Se Vi deziras kontakti aŭ ricevi pliajn informojn pri tiu interesa projekto disvastigi esperanton, ne hezitu kontakti kun la respondeculoj de la Universitato pere de la TTT-paĝo:

[www.universitato.info](http://www.universitato.info)





**La 73-a Hispana Kongreso kaj la 18-a Andaluzia Kongreso de Esperanto okazos en la urbo Arundo (*Ronda*) de la 1-a ĝis la 4-a de majo 2014-a.**



Komence de la venonta monato majo okazos en la malaga vilaĝo Arundo (*hispanlingve Ronda*), la ĉi-jaraj kongresoj de esperanto de Hispanio kaj Andaluzio. Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj la Arunda Esperanto-Klubo organizas ilin. Jen kelkaj detaloj pri la plej grava E-renkontiĝo en Hispanio dum ĉi tiu jaro:

Kongresejo: la oficialaj aktoj okazos ĉe la Monaĥejo “Santo Domingo”, starigita pro la ordono de la Katolikaj Gereĝoj en la jaro 1485, do, temas pri historia konstruaĵo.

Loĝado: en Arundo troviĝas nombraj hoteloj, pli kaj malpli kostaj. Eblas restadi ankaŭ ĉe la junulara restadejo, sur la strato Fernando de los Ríos n-ro 2. Temas pri nova konstruaĵo tute proksima al la stacidomo kaj al la busa stacio, ekzistas ĉambroj por 2, 4, 6 kaj 12 personoj je malmultekostaj prezoj (10-14 eŭroj/nokto).

Programo: ne temas pri *fermita* afero, tamen sendube okazos diversaj prelegoj pri araba kulturo, esperanta instruado, informadiko, flamenko, pri Blas Infante (patro de la andaluza patrujo kiu ankaŭ estis esperantisto), muzikaj koncertoj (flamenko, al-andalusa muziko kaj ankaŭ muziko en esperanto). Speciala estos la nordafrika branĉo de la kongreso, ĉar nia celo estas inviti geesperantistoj de Maroko, Arĝelio kaj Tunizio, do verŝajne okazos prelegoj pri la disvastigo de esperanto en tiu regiono kaj se eble ankaŭ pri la nuntempa politika situacio de tiuj ŝtatoj, t.e. pri la tiel nomata “Araba Printempo”. Ankaŭ oni organizos ekskursojn, la unua tra la urbo Arundo, alia en la romiajn restaĵojn de la apuda *Acinipo* kaj ankaŭ al la belega vilaĝo *Setenil de las Bodegas*. Ege interesa ankaŭ estos la programero *Vivu la Teatro*, organizota de la elstara esperanto-verkisto Miguel Fernández.

Libro-servo: dum la Kongreso estos eble aĉeti librojn en kaj pri esperanto kaj ankaŭ esperantaĵojn.

Oficialaj Ekzamenoj: Oni planas organizi KER-ekzamenojn, laŭ la nova internacia ekzamensistemo de esperanto, kiu estas akorda al la postuloj de la Konsilio de Eŭropo kaj difinas lingvokonajn normojn.

Oni povas plenumi nur parolan aŭ skriban parton aŭ ambaŭ. Se Vi deziras koni plie ĉi tiun ekzamensistemon bv. viziti la TTT-paĝon edukado.net



*Arundo, unu el la plej belaj urboj en Andaluzio gastigos la ĉi-jarajn hispanan kaj andaluzian kongresojn.*

Prezentado de libroj: tutcerte du novaj esperanto-libroj estos prezentataj de la aŭtoroj mem dum la kongreso. D-ino Rafaela Urueña prezentos sian novan verkaĵon pri la Eŭropa Unio; kaj S-ro Ángel Arquillos sian novan poem-libron.

Aliĝo: ĝis nun pli ol 80 gesamidenoj jam aliĝis al ĉi tiu kongreso. Nur mankas Vi! Do, vizitu la paĝon <http://arundakongreso2014.wordpress.com/aligilo/> kaj ne hezitu aliĝi kaj partopreni en la ĉi-jarajn hispanan kaj andaluziajn kongresojn, aŭ simple kompletu la jenajn datumojn kaj sendu ilin per-interrete en la elektronikan adreson: kongreso@esperanto.es

- Persona nomo: \_\_\_\_\_
- Familia nomo: \_\_\_\_\_
- Adreso: \_\_\_\_\_
- Urbo: \_\_\_\_\_
- Poŝta kodo: \_\_\_\_\_
- Lando aŭ regiono \_\_\_\_\_
- Ŝtato: \_\_\_\_\_
- Elektronika adreso: \_\_\_\_\_
- Skajpnomo: \_\_\_\_\_
- Esperanto-nivelo: Nula  Baza  Meza  Alta

Aliĝo-prezoj: ĝis 31/03/14 surloke

Membro de HEF aŭ AEU	45€	55€
Ne-membro de HEF aŭ AEU	55 €	65 €
Junulo (ĝis 30) membro HEF aŭ AEU	35 €	45 €
Junulo ne-membro de HEF aŭ AEU	40 €	50 €

Senpage:

Infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post la 31/12/1989.

Ne-malhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

Pagu la kotizon en jena banko-konto sciigante la tekston:  
*Kongreso plus vian nomon en la konto:*

ES45 2031 0225 54 0100187657 Caja General de Ahorros de Granada  
(se vi loĝas en Hispanio), konto nome de “Asociación Andaluza de Esperanto”.

Por pagi el eksterlando bv. uzi jenan kodon.

IBAN ES80 04873225 1420 00006979 / SWIFT / BIC:  
GBMNESMMXXX konto nome de “Asociación Andaluza de  
Esperanto”.

Se vi preferas pagi pere de *PayPal* bv. kontakti kun  
esperantoarunda@gmail.com Nepre memoru, ke vi devas aldoni 3,4%  
+ 0.35 eŭrojn al via respektiva aliĝkoto, tiu estas la tarifo de *PayPal*  
por transakcio.



*Monaĥejo Santo Domingo en  
Ronda. Ĉefa kongresejo.*



*Acinipo, romiaj restaĵoj  
apud Arundo.*

## LA ANDALUZO KIU INVENTIS ŜTATON EN SUDAMERIKO

Luis Gálvez Rodríguez de Arias naskiĝis en la kadiza vilaĝo San Fernando, en la jaro 1864, ĉe elstara familio. Lia patro estis mar-armea oficiro kaj unu el liaj onkoj eĉ estis ministro pri Mar-armeo kiu ludis gravan rolon dum la revolucio de la jaro 1868. Do, unuavide la destino de la juna Luis ŝajnis troviĝi en foraj maroj ĉe milit-ŝipo.

Tamen, Luis Gálvez preferis studi en Madrido juran sciencan kaj poste labori kiel diplomatiisto. Post kelkaj labor-postenoj en Eŭropo li elmigris en Sudamerikon, kie li laboris kiel ĵurnalisto, komercistoj kaj, oni dire, li eĉ agis kiel spiono. En Brazilo li arivis fuĝe post ruiniĝo. En la amazona urbo Manaŭo, li eklaboris en la ĵurnalo *Commercio do Amazonas*.



Luis Gálvez Rodríguez de Arias  
en la jaro 1900

Manaŭo estis granda urbo ĉe la amazona rivero. Tie, meze de sovaĝa arbaro stariĝis moderna urbo, eĉ oni konstruis oper-teatrejojn kie kantis Caruso mem.

En Manŭao Luis Gálvez amikiĝis al la riĉaj kaŭĉ-industriistoj kaj dank'al sia kapablo agrabligi sin al ĉiuj kaj pro sia flua parolado, li konvikis la industriistojn

cele organizi ekspedicion por okupi la regionon Akron, riĉega rilate kaŭĉ-produktadon.



Laŭ la Traktato de Ajakuço, subskribita en la jaro 1867 de Brazilo kaj Bolivio, la regiono Akro fariĝis bolivia posedaĵo, tamen ĉi ŝtato neniam okupis efektive la regionon, krome preskaŭ ĉiuj enloĝantoj estis *seringueiros* (brazilaj kaŭĉ-laboristoj). Do, la unua celo de la ekspedicio de Luis Gálvez estus okupi la regionon kaj tio plenumiĝis dank'al la financado de la riĉaj brazilaj kaŭĉ-indusriistoj.

Tamen, post okupi la teritorion Luis Gálvez ne faris fidelecan ĵuron al Brazilo, male, li preferis proklami la Sendependan Respublikon Akro, tio okazis la 14-a de julio 1899, okaze de la 110-a datreveno de la franca revolucio.



AKRO  
ĉe sudamerika landkarto

Luis Gálvez estis nomumita la unua prezidanto de la ĵus proklamita respubliko. Li kreis standardon por la nova ŝtato, nomumis la novajn ministrojn, starigis lernejon, hospitalon kaj oni fondis eĉ propran armeon, al kiu aniĝis ĉefe hispanaj ekszilitoj venintaj el la antikva kuba kolonio. La nova ŝtato eĉ eldonis proprajn poŝtmarkojn kaj mokeme, la brazilaj ĵurnalistoj nomis la unuan prezidanton *Ludovikon la Unuan, Imperiestron de Akro*.

Fine de la jaro 1899 interna puĉo finigis la regadon de Luis Gálvez, favore al nova prezidanto Antonio de Sousa Braga, tamen, ĉi lasta, en la jaro 1900 petis al nia ĉefrolulo repreni denove la regadon de la juna respubliko. La 29-a de decembro 1900-a la bolivia armeo okupis la urbon *Puerto Alonso* kaj tiu batalo metis la finan punkton al la Respubliko Akro. La defendantoj kaj Luis Gálvez mem fuĝis en Brazilon.

Post nova pruvo restarigi la respublikon en la jaro 1902 definitive la regionon Akron okupis Brazilo, sub kies suvereneco troviĝis jam definitive post la subskribo de la Traktato de Petropolis en la jaro 1903. Laŭ tiu akordo, Brazilo pagis al Bolivio du milionojn da pundoj kaj promesis la konstruon de fervoja linio.

Kaj... kio okazis al Luis Gálvez? Nu, kiel dirite Luis Gálvez kune kun la armeo de la juna respubliko kapitulaciis al la brazila armeo, kiu malliberigis lin ĉe la Fortreso Sankta Joakimo en Rio Branko, tamen li sukcesis fuĝi en Hispanio. Li mortis en Madrido en la jaro 1935.



Ĉi-jare ĝuu ARUNDO-n (*Ronda*).  
Partoprenu en la Hispana kaj Andaluzia Kongresoj de  
Esperanto. La mondo atendas Vin en Arundo !

## Lingva Angulo

### Rilataj subfrazoj kun “kiu”

Ofte du frazoj povas esti kunigitaj, unu el ili estas la ĉefa frazo kaj la alia subfrazo. Ni vidu, en la hispana lingvo ni ĉiuj komprenas jenan frazon:

*Esta mañana vi a un hombre que hablaba con mi padre.*  
(Ĉi-matene mi vidis viron, kiu parolis al mia patro)

Reale, temas pri du frazoj:

- Ĉi matene mi vidis viron.
- La viro parolis al mia patro.

La viro rolas sur la unua frazo, la ĉefa frazo, kiel objekto “*mi vidis viron*” kaj sur la dua frazo, la subfrazo, kiel subjekto “*la viro parolis...*”. En la dua frazo, la subfrazo, la subjekto, por eviti ripeton, estas reprezentata de la rilata vorto *kiu*. Ni vidu, ke sur la rilata frazo “*la viro parolis...*”, “*la viro*” estas la subjekto de la frazo, do, la vorto *kiu* anstataŭigas ĝin, “*kiu*” ankaŭ agas kiel subjekto. Tiel, se “*kiu*” anstataŭigus rektan objekton (*viron*), tiam ne aperus “*kiu*” sed “*kiun*”, tiel:

- Mi legas libron.
- La libro estas tre interesa.

Se ni kunigas ambaŭ frazojn:

- La libro, kiun mi legas, estas tre interesa.

Tiel, sur la subfrazo *mi legas libron*, tiu libro ne estas subjekto sed rekta objekto, do estas necese uzi la akuzativan formon “*libron*”. La *kiu*-vorto uzata devas aperi ankaŭ sub akuzativa formo:

- La libro, kiun mi legas, estas interesa.

Neniam: *la libro, kiu mi legas...*, se tiel, sur la rilata frazo ni ne povus kompreni perfekte kiu agas kiel subjekto, ĉu *kiu* aŭ ĉu *mi* ?

Kompreneble, se temas pri aro da objektoj aŭ personoj ni uzas la pluralan formon:

- La lecionoj estas malfacilaj
- La profesoro instruas la lecionojn.
  
- La lecionoj, kiujn instruas la profesoro, estas malfacilaj.

Sed, ne necese la rilata vorto *kiu* rolas kiel subjekto aŭ rekta objekto en la subfrazo, ĝi ankaŭ povas agi kiel komplemento post prepozicio, tiel:

- Mi legas la libron.
- Vi parolis al mi multe pri la libro

Ni povus diri:

- Mi legas la libron, pri kiu vi multe parolis al mi.

*Kiu* estus sur tiu subfrazo nek subjekto, nek objekto, sed komplemento post la prepozicio *pri*. Aliaj prepozicioj eblas:

- Vi skribas per komputilo.
- La komputilo misfunkciis.

Tiel, ni povus diri:

- La komputilo, per kiu vi skribas, misfunkciis.

Pliaj ekzemploj:

- La urbo estas granda.
- Li venas de la urbo.

- La urbo, de kiu li venas, estas granda.

La rilata vorto *kiu* povas esti anstataŭigita de la aktiva participo de la verbo, tio estas, la verbo kun finaĵo ANT-INT-ONT.

Ekzemple:

- Mi salutis viron
- La viro promenis tra la strato.

Ni povus diri:

- Mi salutis viron, kiu promenis tra la strato      aŭ
- Mi salutis viron promenantan tra la strato.

Tio estas, la viro, kiun mi salutis, promenis tra la strato en tiu ĝusta momento. La aktiva participo ludas la saman rolon en la frazo ol la vorto al kiu ĝin alludas, tiel se ĝi estis subjekto la aktiva participo agas kiel subjekto, se rekta objekto (-n) kiel rekta objekto (-n).

Ni uzos –ANT- dum la ago ankoraŭ ne finiĝis. Sur la ekzemplo *mi salutis la viron promenantan tra la strato*, ni scias, ke kiam mi salutis la viron, li ankoraŭ promenadis.

Ni uzos –INT- kiam la ago jam finiĝis. Sur la sama ekzemplo, se mi diras: *mi salutis viron promenintan tra la strato*, tio signifias, ke kiam mi salutis lin, li jam finis promeni.

Ni uzos –ONT- kiam la ago ankoraŭ ne komenciĝis, *mi salutis viron promenontan tra la strato*, tio estas, la viro kiun mi salutis, ankoraŭ ne komencis promeni.

Atentu, temas pri grava afero! La aktiva participo ludas la saman rolon en la frazo ol la vorto kiun ĝi alludas, tiel, se mi diras:

- Mi salutis viron promenantan tra la strato.



*Promenantan* rilatas al *viron*, ambaŭ aperas sub akuzativa formo ĉar ambaŭ agas kiel rekta objekto. Tio, signifas ke tiu kiu promenis estis la viro. Male, se:

- Mi salutis viro promenanta tra la strato.

En ĉi tiu frazo, promenanta ne rilatas al viro, vidu, ke ĝi ne uzas la akuzativan formon, do, ĝi rilatas al la subjekto *Mi*. Tiel, estas eble kompreni, ke tiu kiu promenas estis mi... ne la viro.

### **Kiam uzi *-kiu-* kaj kiam uzi *-kio-?***

Ni jam komprenis la uzon de la rilata vorto *kiu*, tamen, ĉu eblas diri *kio*?

Nu, rilata *kio* estas uzata, anstataŭ *kiu*, se la subfrazo priskribas tabelvorton je “o”, ni vidu:

- Li petis, ke tio kion li revis, estu realigata.

Ni uzas *kion* ĉar ĝi rekte rilatas al *tio*.

- Li faris tion kion li povis.
- Ŝi promesis al mi ion, kion mi ne povas forgesi.
- Li ordonas nenion, kion li mem ne kapablas fari.
- Nenio pri kio li parolis estas vera.

Do, se ekzistas rilata *kio*, antaŭe devas ekzisti vorto kun finaĵo “o” troviĝanta sur la tabelvorto. Kompreneble, tiu vorto finiĝanta per “o” povas esti subkomprenita kaj ne aperi rekte sur la frazo.

- Redonu, kion vi prenis  
(*oni komprenas: “redonu tion aŭ ĉion kion vi prenis”*).

## Por kontakti kun la Esperanto-Movado en Andaluzio, bv. uzi jenajn elektronikajn adresojn:

- ✓ Andaluzia Esperanto-Unuiĝo  
andaluciaesperanto@gmail.com
- ✓ Asociación Sevillana de Esperanto  
info@esperantosevilla.org
- ✓ Asociación Cordobesa de Esperanto  
esperanto14@ono.com
- ✓ Jaena Esperanto-Asocio  
ridinda@gmail.com
- ✓ Club de Esperanto de Ronda  
esperantoarunda@gmail.com
- ✓ Asociación Onubense de Esperanto  
rafmagon@yahoo.com
- ✓ Esperanto el Kadizo  
esperantokadizo@gmail.com
- ✓ Bulteno “Monate ĉe Vi”  
angelarquillos@gmail.com
- ✓ Revuo “Gazeto Andaluzia”  
esperanto14@ono.com



TTT-paĝo: [www.esperantoandalucia.com](http://www.esperantoandalucia.com)

## *Turismi en ... Sanlucar de Barrameda* (Kadizo)

Ĉe la enfluejo de la rivero Gvadalkiviro troviĝas unu el la plej belaj vilaĝoj en Andaluzio. Kvankam ĝi apartenas al la Kadiza provinco, trans la rivero ni jam estas sur la onuba Parko Donjano kaj ankaŭ ĝi estas tre proksima al la sevila provinco. Eble pro tio, ni povas aserti, ke *Sanlucar de Barrameda*, la vilaĝo kiun ni vizitas hodiaŭ estas unika loko.

La naskiĝo de *Sanlucar de Barrameda* okazas en la prahistorio kaj, kvankam troviĝis neniu restaĵo de la tarŝiŝa civilizacio, sendube *Sanlucar* ludis, pro sia situo, speciala rolo dum tiu epoko. La verkaĵoj de romiaj geografoj mencias du lokojn kiuj stariĝis ene de la nuntempa vilaĝo, temis pri la loko *Luciferi Fanum* (la templo de la Stelo), kiu povus situi proksime de la nuntempa Sanktejo *El Tesorillo* kaj la dua la urbo *Ebura*, la nuntempa domaro de *Ebora*.

Dum la islama civilizacio *Sanlucar* nomiĝis *Massagued*, laŭdire temas pri la araba traduko de la romia nomo de la urbo *fanum* (templo). Dum tiu epoko *Sanlucar* estis la natura defendejo de la rivero Gvadalkiviro, ni memoru, ke ekde la komenco de la 9-a jarcento kvarfoje okazis vikingaj invadoj tra la rivero Gvadalkiviro, kelkaj el ili eĉ atingis la urbon Sevilon.

Kiam la kastilia reĝo Ferdinando la 3-a eniris en Sevilon en la jaro 1248 kaj finiĝis tiam la araban regadon de la urbo, la kapitulacio inkludis la nuntempajn urbojn Jerezon kaj *Sanlucar*, kvankam la novaj regantoj respektis la vivon kaj religion de la enloĝantaro, kiu ekde tiam ricevis la nomon *mudejares*. Sed en la jaro 1264 la *mudejares* helpis la nordafrikan popolon *benimerines* ataki kaj mortigi la



defendantojn de la kasteloj starigitaj tra la atlantika marbordo, post la reokupo de la teritorio fare de la trupoj de la kastilia reĝo Alfonso la 10-a, oni forpelis definitive la islaman popolon. Estis tiam kiam oni starigis kastelon, konata kiel “*Alcazar Viejo*” kaj muregon ĉirkaŭ la urbo, hodiaŭ ankoraŭ videblas kelkaj restaĵoj ĉe la kvartalo nomita *Albaicín*.

*Sanlucar* pliriĉiĝis dank'al sia haveno kaj al la komerco kun foraj regionoj, kiel Bretano en Francio, la nordo de Eŭropo kaj Ĝenevo en Italio. Kiam oni eltrovis la novan amerikan kontinenton en *Sanlucar* starigis filio de la sevila haveno, kiu monopoligis la komercon inter Hispanio kaj Ameriko. Oni devas elstari ankaŭ, ke en *Sanlucar* finiĝis la unua vojaĝo kiuj ĉirkaŭigis la teron, tiu de Juan Sebastián Elcano en la jaro 1522.

*Sanlucar de Barrameda* estis la sidejo de la Duko de *Medina Sidonia*, li starigis tie sian plej gravan palacon, la riĉeco de ĉi tiu nobelo kaj ankaŭ lia elstara kultura agado estis tre grava por la urbo mem. Hodiaŭ *Sanlucar* estas la sidejo de la Arĥivo de la Duko de *Medina Sidonia*, grava dokumentaro por kompreni la historion de Andaluzio dum tiuj jaroj. La konsidero de *Sanlucar* kiel nobela urbo, ĉar tie loĝis la Duko de *Medina Sidonia*, altiris la atenton de aliaj nobeloj, kiuj starigis tie belegajn domegojn por loĝi ĉefe dum la somero, profitante la marbordon.



Juan Sebastián Elcano  
finigis la unuan vojaĝon  
ĉirkaŭ la Tero en  
*Sanlucar de Barrameda*  
en la jaro 1522

Tiel, fine de la 19-a jarcento kaj komence de la 20-a *Sanlucar* estis la urbo kie somerumis la hispanaj nobeloj, pruvo pri tio estas la ekzisto, ankoraŭ nuntempe, de belaj konstruaĵoj apud la enfluejo de la rivero Gvadalkiviro kiuj, siatempe, apartenis al tiuj nobeloj. *Sanlucar de Barrameda* estas hodiaŭ grava urbo kun preskaŭ 70.000 enloĝantoj,

kies ekonomiaj rimedoj baziĝas ĉefe en la agrikulturo kaj la fiŝkaptado. Tie, oni ellaboras unu el la plej gustumitaj vinoj en Andaluzio, la *manzanilla*.

### Monumentoj:

- Palaco de la Dukoj de *Medina Sidonia*.

Starigita dum la 16-a jarcento ĝi estas laŭstile renesanca. Nuntempe ĝi estas la sidejo de la Fondaĵo *Medina Sidonia* kaj sidejo de enhavriĉa historia arĥivo.



- Kastelo de *Santiago*.

Konstruita inter 1477 kaj 1478 de la Duko de *Medina Sidonia*, temas pri tipe kastilia kastelo kun granda centra turo.

- Palaco de *Orleans y Borbón*.

Starigita de 1853 ĝis 1870 ĝi estis la somera domo de la gesroj Antonio Orleans kaj María Luisa Fernanda de Borbon, dukoj de *Montpensier* kaj hispanaj infantoj. La faŝado estas stile ital-klasika, kvankam eblas trovi ankaŭ arabajn elementojn. La ĉambroj estas laŭstile tute malsimilaj, tie ekzistas ĉambroj laŭ la stiloj ĉina, araba, angla, baroka, ktp. La ĝardenoj estas stile anglaj. Nuntempe ĝi estas la urbodomo de *Sanlucar de Barrameda*.

### Gastronomio:

Kiel dirite, unu el la plej ĉefaj ekonomiaj resursoj de *Sanlucar de Barrameda* estas la fiŝkaptado, ĉefe la salilokoj kaj aliaj mar-fruktoj,



kiel la kalmaroj. Kompreneble ĉi ĉio, akompanita de la mondfama vino *manzanilla*.

### Festoj:

Krom la andaluze tipaj karnavalo kaj paskaj festoj, oni devas elstari la famajn ĉeval-kurojn organizitajn ĉe la marbordo. Ili okazas ekde la jaro 1835 kaj ĉi-loke la hipodromon oni anstataŭigas per la plaĝo mem, ĉiuj elementoj propraj de la ĉeval-kuroj, ekz. vetoj, amasa publiko, ktp, kompreneble ankaŭ troviĝas ĉe ĉi tiuj specialj kuroj. Ili okazas dum la monato aŭgusto.



Ĉeval-kuroj en la plaĝo de *Sanlucar de Barrameda*



Aera fotografiaĵo de *Sanlucar de Barrameda*. Videblas la enfluejo de la rivero Gvadalkiviro kaj fronte al la urbo la komenco de la Nacia Natura Parko Donjano.

## Paĝoj pri Nia Historio

### ***Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio***

*Felipe González del Pino*

La hispana civila milito (1936-1939) metis finan punkton al la agado de la esperantistaro en Andaluzio. Foje, tiu haltigo estis tragika, ĉar okazis la morto de kelkaj esperantistoj, ekzemple Rogelio Luque Díaz, kordova samideano mortpafita en aŭgusto de 1936. Alifoje, la esperantistoj savis sian vivon dank'al sia ekzilo fore de Hispanio, tiel Francisko Azorín, la plej ativka samideano en Kordovo, kiu fuĝis en Meksikon kie loĝis post 1939 ĝis sia forpaso en la jaro 1975. Sed, tiuj esperantistoj kiuj restis en Andaluzio ĉesis kian ajn agadon favore al la disvastigo de la zamenhofa lingvo.



Felipe González del Pino,  
sevila esperantisto  
1911 ~ 1986

Kiam finiĝis la franksiman reĝimon, en la jaro 1975, kaj dank'al la streboj de kelkaj esperantistoj loĝantaj en Seville, estis eble instrui denove la lingvon en tiu urbo ĉe la tiel nomata: *Academia Sevillana de Esperanto* (Sevila Akademio de Esperanto). Antolín Colmenar, pri kiu ni jam parolis ali-numere, estis la kerno kaj motoro de tiu akademio, eĉ oni uzis kiel sidejon por instrui la lingvon antikvan vendejon kiu apartenis al li. Tamen, tiu kiu instruis la internacian lingvon dum tiuj jaroj estis Felipe González del Pino. Kiu li estis?

Felipe González del Pino naskiĝis en la jaro 1911, li estis unu el la plej prestiĝaj instruistoj en Seviljo, antaŭ la civila milito li estis instruisto ĉe la tiel nomataj *eksperimentaj lernejoj*, temis pri specialaj eduk-centroj kie oni aplikis la plej modernajn pedagogiajn rimedojn. En Seviljo nur funkciis kiel eksperimenta lernejo tiu nomita “Giner de los Ríos”, tie sendube la plej aktiva instruisto estis Felipe González del Pino. Li ellaboris specialan metodon por ke la infanoj sukcesu eklegi, la “*Metodo por la instruado de la grafika lingvo*”, pli konataj en ĉiuj lernejoj kiel la *metodo de la kartonoj*, pro la fakto, ke la instruado baziĝis sur slipoj (kartonoj), kie la infano povis vidie kune kun la vorto la bildon de la objekto.

Pri ĉi tiu metodo oni ellaboris diversajn esojn kaj eĉ oni instruis ĝin en la Porinstruaj Fakultatoj ĝis la 8-a jardeko. Tiu metodo por eklegi baziĝis sur kvar unuaj simplaj frazoj kiuj utilis al infanoj ne nur por eklegi sed ankaŭ por ekkompreni la plej bazajn matematikajn operaciojn.

Kompreneble, Felipe González del Pino estis elstara intelektulo kaj tiel, post la civila milito, la nova eduka administracio de la frankisma reĝimo reprezaliis kontraŭ ĉi tiu progresema instruisto. Esploristoj asertas, ke la kvarono de la instruistaro en Hispanio suferis reprezalion, multaj



Felipe González del Pino estis la aŭtoro de diversaj libro-metodoj kiuj celis eklegi

perdis definitive sian labor-postenon, aliaj oni devigis ilin translokiĝi en foraj urboj kaj regionoj. Jen la kazo de Felipe González del Pino, kiu estis sendita en la Kanarian Insularon, kvankam oni permesis lin labori kiel instruisto.

Felipe González sendube estis kuraĝa homo. Tiel, kiam post kelkaj jaroj oni rajtigis lin reveni en Sevilon, li kutime ĉeestis la lokojn kie, kaŝite, renkontiĝis la respublikaj kaj maldekstraj aktivuloj de la urboj, ĉefe ĉe la fama trinkejo *Bodega de Morales*, proksime al la Katedralo, ĉe tiu loko renkontiĝis la respublikanoj, kaj eĉ la polico konis tion. Anekdote oni diris, ke Felipe González del Pino decidis starigi altareton omaĝe al la Virgulino ĉe la trinkejo, la respublikaj kunuloj, la plejmultaj el ili kontraŭ-religiemaj, ne komprenis tiun agon, tamen la policianoj, kiuj de tempo al tempo vizitis la trinkejon por kontroli la ĉeestantojn, gratulis lin. Nek la policianoj, nek la vizitantoj de la trinkejo vidis ke la altaro de la Virgulino estis starigita uzante florojn ruĝajn, flavajn kaj violajn, same ol la standardo de la hispana respubliko, al kiu, kaŝite, Felipe González decidis omaĝi.

Verŝajne Felipe González del Pino lernis la internacian lingvon antaŭ la civila milito. Pro sia amo al edukado li pensis, ke la plej efika propagandilo estus la instruado de esperanto, tamen tio estis tute nebla en Sevilon dum la frankisma reĝimo. Sed en la jaro 1976, kelkaj monatoj post la forpaso de la diktadoro, Felipe González organizis kurson de la internacia lingvo ĉe la lernejo “José María Izquierdo”, kie li laboris kiel instruisto. En tiu sama jaro, 1976, li ekigis la instruadon de esperanto en la ĵus kreita *Academia Sevillana de Esperanto* (Sevila Akademio de Esperanto) kaj li kunhelpis la ellaboradon de la unuaj bultenoj eldonitaj de la Akademio. Laŭ li, *esperanto estas fundamenta elemento de paco kaj unuiĝo inter la popoloj, ĉiuj scias, ke estas pli bone kompreni sin ol militi. Krome, esperanto estas lingvo bela, harmonia, facila kaj ĝi pligrandigas la intelektan horizonton.*

Fine de sia vivo, kiel ĉiuj saĝuloj, li decidis retiriĝi en la kamparon, konkrete ĉe domo en la onuba siero, kie li decidis loĝis senkomforte en rekta kontakto kun la naturo. Li forpasis en la jaro 1986.

## FLAMENKO

### *La Alegrijoj*

La alegrijoj estas la flamenka kantaĵo kaj dancado plej ligita al la kadiza popolo. La unua mencio pri la alegrio aperas en la verkaĵoj de Antonio Machado “Demófilo”, flamenka esploristo kaj patro de la poetoj Antonio kaj Manuel Machado. En 1881 li parolis pri kelkaj kantaĵoj naskiĝintaj en la provinco Kadizo dum la komenco de la 19-a jarcento, li parolis pri *juguillos* (ludiletoj) aŭ *alegrias* (ĝojoj). De tie devenas la vorto *alegrijoj*.

La bazo de la alegrijoj estas la kadiza ĥoto, kiun enirigis la aragonanoj en Kadizon dum la napoleona invado de Hispanio. Ĝi similas al antikvaj kantaĵoj kiel la *rosa* kaj la *coplas romanceras*. La alegrio estas kantaĵo tipe festa, kie la dancado estas esenca, kaj kvankam viroj kaj virinoj povas danci la alegrijon, temas speciale pri virina danco. Post la alegrio naskiĝis la bulerio kaj la tango, tamen ĝi estas la plej ritma speco de la flamenka arto.

*Enrique el Mellizo*, fama kadiza kantisto de la fino de la 19-a jarcento, metis la bazojn de la nuntempa alegrio, kvankam poste aperis aliaj tipaj de Kordovo, Utrero, Lebriho, ktp. La strukturo de la alegrio baziĝas sur kvar oksilabaj versoj. La melodio estas plenĝoja kaj tiel gravas estas la kantaĵo kiel la dancado. La tempo estas pli rapida ol la ceteraj flamenkaj kantaĵoj.

La plej gravaj kantistoj de alegrijoj estis Enrique Butrón, Ignacio Espeleta, kiu kreis la faman ritmon *tiriti, tran, tran*,



Ignacio Espeleta,  
kadiza flamenka kantisto.  
1871 ~ 1938

*tran...* por agordi la voĉon antaŭ ol ekkanti, Chato de la Isla, Pericón de Cadiz, Aurelio Selles, La Perla de Cádiz, Chano Lobato kaj El Folli.

### Alegrioj

Diru jam mia kunulino,  
kio okazas al mi,  
ĉar mi ne povas ripozi  
se mi ne dormas apud vi.

*Kantisto: El Torta*

Por nenio utilas la sperto,  
la saĝeco tute ne plenas,  
fine ĉion oni forgesas  
kiam la amo venas.

*Kantisto: Fosforito*



## ALIGU AL *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: [andaluciaesperanto@gmail.com](mailto:andaluciaesperanto@gmail.com)  
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe unu el la jenaj kontoj:

- Caja General de Ahorros de Granada  
ES45 2031 0225 54 0100187657
- BBVA  
ES81 0182 4106 71 0207160717

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2014

**DANKON! Ni bezonas ĉies helpojn kaj apogojn.**



## ANDALUZA KUIRARTO

### *Kikeroj kun Moruo*

La Pasko en Andaluzio estas festo kun propra gastronomio. Laŭ la katolika tradicio oni ne devas manĝi viandaĵojn dum la paskaj vendredo kaj sabato, pro tio oni kuiras specialajn manĝaĵojn kun la plej bongustaj legomoj kaj fiŝaĵoj. Jen, unu el tiuj bongusta kuirajoj: *kikeroj kun moruo*.

#### Jen la necesaj ingredientoj:

- 250 gramoj da kikeroj.
- 200 gramoj da moruo.
- Oliv-oleo, proksimume 5 kuleroj.
- 1 verda kapsiko, tranĉita.
- 2 cepoj, unu el ili tranĉita.
- 1 ajlero.
- 1 laŭr-folio.
- Dolĉa kapsiko (1 kulereto)



#### Jen la preparado:

Estos necese subakvigi kaj la kikerojn kaj la moruon dum la tuta antaŭa nokto, ok horoj sufiĉas. Post tiu tempo oni degutigas kikerojn kaj moruon.

Ene de poto subakvigu laŭr-folion, cepon tranĉitan kaj la kikerojn. Kovru la poton. Ene de pato lante kuiru su la oleo, la alian cepon, la ajleron kaj la verdan kapsikon, poste aldonu la dolĉan kapsikon. Post kelke da tempo verŝu ĉi ĉion en la poton kie estas la kikeroj kaj la akvo.

Post kelkaj minutoj aldonu la moruon kaj boligu la tutaĵon.



## Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio


Ĉi-numere ni ne parolos pri misteraj okazintaĵoj travivitaj iuloke en Andaluzio, sed ja pri libro ĵus eldonita pritraktanta ĉi tiajn temojn. Temas pri *Guía Secreta de Casas Encantadas de Córdoba* (Sekreta Gvidlibro de Hantataj Domoj en Kordovo), verkita de José Manuel Morales Gajete (Kordovo, 1981) kaj eldonita de *Almazara*.

La aŭtoro studis universitate Entreprenajn Studojn kaj en la jaro 2013 li kreis la entreprenon “Córdoba Misteriosa” (Mistera Kordovo), tie oni oferas noktajn itinerojn tra

misteraj lokoj de la urbo. Li ankaŭ kunverkis la libron “Guía Secreta: Córdoba Misteriosa” (Eld. Almazara, 2010).

La libro oferas kompletan rakonton de misteraj okazintaĵoj kaj legendoj de la urbo Kordovo kaj kelkajn ankaŭ de la provinco. La libron oni legas plezure kaj tra la paĝoj aperas ne nur antikvajn legendojn sed, kaj tio plie valoras, ankaŭ la plej modernajn poltergeistajn kazoj en la urbo, unu el ili, tiun okazintan ĉe la Jura Fakulato en Kordovo ni jam preparolis en nia revuo, aŭ ĉe privata hejmo. Sendube, la plej grava afero de la libro estas la fakto, ke la aŭtoro baziĝas sur rektaj informoj de la atestantoj de tiuj misteraj okazintaĵoj, eĉ sciigante pri realaj nomoj, ekzaktaj lokoj kaj konkretaj datoj.

Resume, temas pri leginda libro ege rekomendinda al ĉiuj kiuj amas misterojn.



## Krucvorttenigmo

	A	B	C	Ĉ	D	E
1						
2						
3						
4						
5						
6						

1. Esperantigita, nomo de la urbo kie okazos ĉi-jare la Hispana kaj Andaluzia Kongresoj de Esperanto. 2. Prepozicio ■ *Inverse*, nedifina pronomo montranta iun objekton, aferon aŭ ideon. 3. *Inverse*, ŝtone ■ Vokala Finaĵo. 4. *Plurale*, interna parto de la manoj 5. Participa finaĵo ■ *Inverse kaj sen la lasta vokalo*, ekstera monro de ies forto aŭ kapablo 6. *Inverse*, eŭropa ŝtato.

A. Persono inicita en sekton aŭ doktrinon. B. Denove memori, ke oni jam aŭdis, vidis, legis ion. C. Vokalo. ■ *Inverse*, prefikso uzanta antaŭ unuoj kaj signifanta milo. Ĉ. *Sen la lasta vokalo*, ordinara, laŭregula ŝtato. ■ Vokalo. D. *Inverse kaj sen la lasta vokalo*, filo. ■ *Sen la lasta vokalo*, en la fabeloj, giganto infan-manĝanta. E. Vokalo. ■ *Inverse*, estanta en feliĉa kaj bonhumora ŝtato.

## HUMURO



La numero 99-a de nia revuo aperos komence de la monato majo, koincide kun la venonta Andaluzia Kongreso de Esperanto kaj ĝi utilos kiel kongreslibro.

Ni dankas Vian kunlaboradon, ĉar la eldonado de revuo nur estas ebla se ni ĉiuj kunlaboras. DANKON !

esperanto14@ono.com

GAZETO ANDALUZIA  
Apartado de Correos 3142  
14080 CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio)

**Andaluzia Esperanto-Unuiĝo**  
**Asociación Andaluza de Esperanto**



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.  
Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López  
Sekretario: José María Rodríguez Hernández  
Kasistino: María Dolores Torres Mateo  
Voĉdonanto de Sevilo: José Roldán León  
Voĉdonanto de Malago: Karmela San Segundo Cordero  
Voĉdonanto de Onubo: Rafael Mateos González  
Voĉdonanto de Arundo: Fátima Jiménez García  
Voĉdonanto de Jaeno: Nomumota  
Voĉdonanto de la Malaga Akserkio: Nomumota  
Voĉdonanto de la Junularo: Juan Diego Díaz Bautista

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: [angelarquillos@gmail.com](mailto:angelarquillos@gmail.com)  
[esperanto14@ono.com](mailto:esperanto14@ono.com)

Blogo: [www.andaluciaesperanto.blogspot.com](http://www.andaluciaesperanto.blogspot.com)  
TTT-paĝo: [www.esperantoandalucia.com](http://www.esperantoandalucia.com)

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

\* Universala Esperanto-Asocio  
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)  
[uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)

\* Hispana Esperanto-Federacio  
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)  
[admin@esperan](mailto:admin@esperan)





IBa andaluzia kaj 73a hispana

**kongresoj de esperanto**

arundo. 1 - 4 majo 2014